# *E*speranto - *N*umismatika *A*socio






**Esperanta Numismatiko** 2024 **Jarkolekto 11 - Numero 2**





*Otokar Marik fils CS, X2 ca. 1980*
*Ludwig Spindelberger A*
*Salzburg, ½ talerklippe, Wolfgang Diederik van Raitenau-Langenstein 1587-1612*

# *E N H A V O T A B E L O*

## de aprilo 2024


Titolpaĝo: ………………………………………………………..……..... 1

Enhavotabelo ……………………………………………………….. 2

De ni por … ni! …………………………………………….......... 3

Moneroj & medaloj ……………………………………….……..... 4

*Valencio 1997*

*Duobla jubileo en Bulgario 1987*

*Otto Dix (1891 – 1969)*

*Premio Klara Silbernik*

Spikumaĵoj & suplementoj………………………..……..……. 11

Aspektoj de numismatiko: Ekslibrisoj (2) …………………..……… 14

Valormarkoj & valorbiletoj: Ludmono ……………………………. 17

Por spuremuloj: IFEF - medalo …………………………………..….. 18

Historiaj aspektoj: "Verda stelo sur la brusto …" …...……….………… 19

El la gazetaro ……………………………………….……..……… 21

Terminaro: Alfabeta listo (37) …………………………….......... 22

Numismatika Forumo: Kriptomono- nenio nova sub la suno! ..………. 23

Retpoŝto ……………………………………………….………….. 25

Anoncoj & eventoj …………………………….………..………… 38


***Honora membro: Hans Jankowski (1928-2018)***


Tajpado kaj paĝaranĝo: Vivienne Tudts
Provlegado: Jozefo Horvath
Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!
Finredaktoro: Bert Boon

Kontakto: bert.boon@skynet.be
Retejo: http://ena.frali.bplaced.net
www.esperanto.es/biblioteko
www.kolektado.esperanto.cc

# *DE NI POR ... NI!*

***"Spesmilo vojon trabatas"***
***(Zamenhof: "Proverbaro esperanta")***

Tre ofte, tro ofte, dum la epoko en kiu mi, paŝeton post paŝeto, iĝadis esperantisteto, kontraŭuloj de la zamenhofa internacia helpolingvo - ne sen malica ĝojo! - uzis kaj emfazis en dialogoj kaj paroladoj pri Esperanto - kiel batego per forĝmartelego! - la epiteton (domaĝe *ne-ornaman!*) "**artefarita**" por senkreditigi la genian projekton de Ludoviko Lazaro. "A-r-t-e-f-a-r-i-t-a", fi, trifoje fi !!!

Mia kontraŭa argumento, kiel replikdemando, "Ĉu infano, kiu estas la rezulto de 'artefarita' fekundigo envitra do ne estas plenvalora homa kreaĵo?" instigis nur al mokridado, kapskuado kaj ŝultrotiroj. Jen do, perfekta ekzemplo de "du mezuroj kaj du pezoj", ĉu ne?

Ĉiel, karaj legantoj, mi tamen provizore garantias, ke nia ENA-revuo ĝis hodiaŭ neniam estis kreita kiel rezulto de DMAI, t.e."Diĝita Mirlanda Artefarita Inteligenteco"!

Sendube, tiu nova "ora bovido" havas kaj havos ankaŭ avantaĝojn en certaj branĉoj de la socio kaj de la scienco, estonte pli bona kaj pli akurata ilo por pli efike kaj pli rapide solvi problemojn de la ĉiutaga vivo. Tamen, ĉiu eltrovo, kiel abunde pruvas la homa historio, iam estos misuzata, por damaĝi la teron kaj la vivkondiĉojn de ĝiaj t.n. hereduloj… Ĉu ĝi ekzemple ne jam nun minacas detrui la esence proprajn homajn kreivecon kaj elpensemecon?

Eble jen tro "serioza kaj negativa temo", mia hodiaŭa enkonduko, sed en la artikoloj kaj ilustraĵoj vi certe, laŭ kutimo, trovos pozitivajn aspektojn de arto, (numismatika) historio, homa socia vivo kaj de aliaj fenomenoj, kiuj espereble donos al vi la eblecon ĝui historiajn eventojn kaj artefaktojn, kiuj, malgraŭ seriozeco, ankaŭ helpos vin ĝui la ne-artefarite kreitajn legaĵojn kaj numismatikaĵojn en nia dua numero de la 11a jarkolekto.

Viaj reagoj kaj kontribuoj senĉese restos bonvenaj kaj plenvaloraj por la redakcio. Ni antaŭ-dankas vin, eĉ se vi nur trafoliumus la paĝojn de nia revuo! Estu tamen niaj heroldoj, se eblus!

Jen tamen ekstraĵo sensacia! Okaze de granda jubileo en Glivice (Pollando), la aktuala grupo intencas eldoni diversajn medaletojn kun la sama motivo, sed en diversaj metaloj.

Nia membro kaj peranto de la klubo, Stanislao Mandrak, pretas reagi al petoj de legantoj kiuj dezirus mendi unu aŭ pliajn el la memoraĵoj tiurilate, do ne nur la medalojn, sed ankaŭ biletojn, poŝtkartojn, poŝtmarkojn. Jen lia kontaktadreso: **stanislaw.mandrak@gmail.com**.

En la rubriko "Anoncoj kaj Eventoj" vi povas jam admiri la diversajn tipojn de moneretoj kaj ankaŭ la monbileton, kiun ni ĉi tie je via servo jam montras.







78a UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO
VALENCIO
HISPANIO
24-31 JULIO 1993


7 INTERNACIA ESPERANTO-KONGRESO
56 HEF-KONGRESO
VALENCIO
HISPANIO
8 - 13 JULIO 1997

## Tipo D2 - Plaketoj kaj medalonoj

Hispana Kongreso en Valencio 1997




| | |
|---|---|
| Lando: Hispanio | Kvanto: *serĉata* |
| Metalo: kupro kaj ligno | Pezo: 200 g |
| Diametro: 145 mm (ligna disko) | Medalisto: *serĉata* |
| Jaro: 1979 | Diko: 15 mm |

***Averso:***(unuflanka)

supre: "7 INTERNACIA ESPERANTO - KONGRESO / 56 HEF – KONGRESO"

meze: fama antikva urbopordego "Torres de Serranos" en Valencio

sube: "VALENCIO HISPANIO 8 - 13 JULIO 1997"

### *Rimarko1:*

ni prezentas sur la antaŭa paĝo du preskaŭ identajn murmedalojn, escepte por la surskriboj. Inter ambaŭ troviĝas tamen ses jaroj. Tre probable la du medalistoj estis nur unu persono. Ĉu la organizintoj estis tiel kontentaj pri la unua, ke ili mendis "kopion" almenaŭ rilate al la bildaj elementoj? Aŭ ĉu mankis novaj ideoj aŭ rimedoj?

### *Rimarko2:*

stranga estas la mencio "7 internacia esperanto-kongreso", ĉar temas pri memoriga medalo de la 56a **nacia** hispana kongreso. Ĉu la ses aliaj naciaj kongresoj jes aŭ ne estis "internaciaj"?





## Tipo E1 - Ordenaspektaj medaloj

Duobla jubileo en Bulgario en 1987



| | |
|---|---|
| Lando: Bulgario | Kvanto: *serĉata* |
| Metalo: bronzo | Pezo: 15 g |
| Diametro: 30 mm | Medalisto: Bogomil Ĵivkov |
| Jaro: 1987 | Diko: inter 2 kaj 3 mm |

### *Averso:*

busto de Zamenhof, iom dekstren
ambaŭflanke ĉe la busto: glataj ornamaĵetoj vertikalaj
dekstre, vertikale: "D-ro L.L.ZAMENHOF 1859-1917"

### *Reverso:*

ambaŭflanke ornamaĵetoj vertikalaj
meze: "1887-1987 ESPERANTO ★ 1907-1987 BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO"

### *Rimarko1:*

medalo farita memore al la 100-jara jubileo de Esperanto kaj al la 80-jara ekzisto de la Bulgara Esperantista Asocio (BEA)

### *Rimarko 2:*

la medalo kaj la atesto estis omaĝe disdonita al meritaj membroj de BEA.

### *Rimarko 3::*

pri la **artisto-medalisto**: vidu jarkolekton 10, numeron unu, paĝon 15




Wilhelm Heinrich Otto Dix naskiĝis en Gera-Untermhaus (Germanio) la 2an de decembro 1891 kaj mortis la 25an de julio 1969 en Singen.

Li estis unu el la plej famaj pentristoj kaj grafikistoj de la 20a jarcento en Germanio.

Lia verkaro estas tre varia. Liaj plej konataj pentraĵoj estas la primilitaj. Li estis tiel aktiva, ke restis pli ol 6 000 desegnaĵoj kaj skizoj, malgraŭ persekutoj far hitleranoj. Li ankaŭ postlasis pentraĵojn kaj akvarelojn, kiuj tre forte memorigas pri la renesanca stilo de la 16a jarcento. Krome, li kreis diversajn portretojn.

Multaj el liaj verkoj troviĝas en la Arta Muzeo de Stuttgart kaj en la Muzeo Gunzenhauser en Chemnitz.

Dix esperantistiĝis en 1909 en la Laborista E-klubo en Gera. Kiam li studis en Dresden li iĝis membro de la loka Esperanto-klubo. Dum lia militservo li ofte korespondis esperantlingve kun s-ino Helene Jakob el Dresden. La faŝistoj de la Tria Regno proklamis liajn artverkaĵojn "fiarto". Ili forigis multajn artefaktojn el muzeoj kaj eĉ bruligis diversajn el ili.




Esperanta letero per armea poŝtkarto















## Tipo B1 – Ne-esperantaj moneroj kaj medaloj rilate al Esperanto

Otto Dix (1891 – 1969)




| | |
|---|---|
| Lando: Germanio | Kvanto: ĉ. 800 000 |
| Metalo: arĝento | Pezo: 18 g (arĝento 0,925) |
| Diametro: 32,5mm | Medalisto: *serĉata* |
| Jaro: 2016 | Diko: *serĉata* |

### *Averso:*

silueto de la artisto maldekstren kun cigaredo inter la lipoj. Parte dekstre, parte sur la silueto: dancanta paro en stilo de la intermilita epoko.

sube: "125. GEBURTSTAG OTTO DIX"

### *Reverso:*

supre: "BUNDESREPUBLIK DEUTSCHLAND"

sube, ambaŭflanke: ses steletoj

tute sube: "2016 G SILBER 925 20 EURO"

rande: "DU MUSST ALLES SELBER SEIN!" (Ĉio vi estu mem!)

***Rimarko 1:***

G: simbolo de la ŝtata monfarejo de la urbo Karlsruhe (Baden-Württemberg)

***Rimarko 2:***

arĝento 925/1000 estas ankaŭ nomata "sterling-arĝento"

## Tipo D1 - Esperantaj unuflankaj medaloj

Premio Klara Silbernik




| | |
|---|---|
| Lando: Hispanio | Kvanto: 27 (minimume) |
| Metalo: arĝento | Pezo: *serĉata* |
| Diametro: 50 mm | Medalisto: *serĉata* |
| Jaro: ekde 1975 | Diko*: serĉata* |

***Averso:***

busto de la edzino de Zamenhof; vizaĝo preskaŭ fronte
supre: “PREMIO KLARA SILBERNIK”
sube, rande: “HISPANA ESPERANTO - MUZEO”
sube, meze: “HONORE AL LA EDZINO DE ESPERANTISTO”

***Reverso:***

la nomo de la edzino/ vidvino kaj la jaro de la honorigo. Ricevis ĝin 27 virinoj. Listo mankas.

***Rimarko 1:***

en la kultura kadro de la Hispana Esperanto-muzeo en San Pablo de Ordal oni iam decidis krei premion, per kiu ekde 1975 (Internacia Tago de la Virino) ĉiujare estu premiata edzino de esperantisto, abnegacie helpinta kaj subteninta sian edzon en lia agado por Esperanto

***Rimarko 2:***

vidu ankaŭ nian kontribuaĵon rilate al tiuj premio kaj persono en *jk.10, n-ro 4, p. 16*

А. М. НЕДОШИВИНЪ.

О МЕЖДУНАРОДНОЙ

**монетной системѣ**

и

**ЭСПЕРАНТСКОМЪ ЧЕКОВОМЪ БАНКѢ**

**ВЪ Г. ЛОНДОНѢ.**

Докладъ, прочитанный на XX Очередномъ засѣданіи Правленія Ковенскаго Общества Эсперантистовъ, 9 декабря 1911 года.

PRI INTERNACIA

**MONSISTEMO KAJ ESPERANTISTA ĈEKBANKO**

**EN LONDONO.**

Raporto, tralegita de A. M. Nedoŝivin en la XX Ordinara kunsido de l'Komitato de Kovna Esperantista Societo, la 9$^{an}$ de decembro 1911 j.

КОВНА.

Товарищество „Типографія Соколовскаго" въ Ковнѣ.

1912.

**Международная монетная система Internacia monsistemo**

Elpensita de R. de Saussure en 1908. Oficiale uzata de U. E. A.

1 Sm. (spesmilo) = 100 Sd. (spesdekoj) = 100 S. (spesoj).
10 Sm. egalvaloras ormoneron da 8 gramoj, laŭ proporcio $^{11}/_{12}$.

| L a n d o. | Valoro de la nacia mono laŭ la Spesmilo (Sm). | Valoro de la Spesmilo laŭ la nacia monunuo |
|---|---|---|
| Argentino | 1 peso = 100 centavos = 2,019 | 1 Spesmilo = 0,505 pesos. |
| Aŭstrio-Hungarujo | 1 krono = 100 heller = 0,416 | — = 2,40 kronen. |
| Bolivio | 1 boliviano = 100 centavos = 0,851 | — = 1,174 boliviano. |
| Brazilujo | 1 milreis = 1000 reis = 1,121 | — = 0,892 milreis. |
| Ĉilio | 1 peso = 100 centavos = 1,436 | — = 0,676 pesos. |
| Egiptujo | 1 Eg.shilling = 5 piastroj T. = 0,510 | — = 1,955 Eg.shilling |
| Francujo | 1 franc = 100 centimes = 0,396 | — = 2,525 francs. |
| Germanujo | 1 mark = 100 pfennig = 0,478 | — = 2,046 mark. |
| Granda Britujo | 1 shilling = 12 pence = 0,498 | — = 2,003 shilling. |
| Hindujo | 1 rupee = 16 annas = 0,970 | — = 1,031 rupee. |
| Hispanujo | 1 peseta = 100 centimos = 0,362 | — = 2,762 pesetas |
| Japanujo | 1 yen = 100 sen = 1,010 | — = 0,978 yen |
| Meksikujo | 1 peso = 100 centavos = 1,029 | — = 0,495 pesos. |
| Nederlando | 1 gulden = 100 cents = 0,827 | — = 1,21 gulden. |
| Portugalujo | 1 milreis = 1000 reis = 2,019 | — = 0,451 milreis. |
| Rusujo | 1 rubl = 100 kopiejki = 1,056 | — = 0,947 rubl. |
| Svedujo | 1 kron = 100 öre = 0,546 | — = 1,82 kron. |
| Turkujo | 10 piastres = 400 para = 0,924 | — = 10,983 piastres. |
| Usono | 1 dollar = 100 cents = 2,052 | — = 0,482 dollars. |
| Venezuelo | 1 bolivar = 100 centavos = 0,396 | — = 2,525 bolivar. |

Belgujo, Bulgarujo (100) stotinki, Grekujo (100 lepta), Italujo, Rumanio (100 bani), Serbujo (100 para), Svisujo same kiel Francujo; Danujo, Norvegujo same kiel Svedujo; Aŭstralio same kiel Granda Britujo; Kanado same kiel Usono.

**ENA tutkore dankas Anatolon Sidorov pro la interesaj informoj el dokumentoj de 1912 pri la historio de la spesmilo-monunuo.**

# Esperanto en uniformo



*"Foto de matrosoj-esperantistoj sur la ferdeko de SMS Zrínyi, 1918. Seiner Majestät Schiff Zrínyi estis batalŝipo de la klaso Radetzky, en la jaroj 1911-19 en la Aŭstria-Hungaria Mararmeo, en 1919-20 – Usona. En la Esperanto-gazetaro aperas mencioj pri la ŝipo; en aprilo 1914 en "Esperanto" ĝia maristo Emilo Halounek el la urbo Pola (Pula, Istrio) anoncis la deziron korespondi "kun ĉiuj landoj krom Aŭstrio"; en 1918 la gazeto raportis pri s-ro F. Krejĉi, kiu gvidis pormaristan kurson sur la ŝipo"*

http://anno.onb.ac.at/cgi-content/anno-plus?aid=e0f...
[la foto "Esperantisten auf der S. M. S. Zrinyi 1918" venas de Bildarchiv Austria]




"*1916, Galicio, orienta fronto de la unua mondmilito. En la foto videblas du aŭstraj soldatoj ĉe "Esperanto-hejmo"; dekstre: Julius Glück (1877-1942), brava Esperanto-propagandisto, viktimo de la nazioj en Aŭŝvico"* https://eo.wikipedia.org/wiki/Julius_Gl%C3%BCck

## Esperanta stenografio






UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
CENTRA OFICEJO: ~~[illegible]~~ GENÈVE (Svislando)

ESPERANTISTA RESPONDKUPONO

Por internacia afranko de unu letero 20 grama

VALORO: 30 centimoj svisaj
N-ro 10468

Akceptata de la Centra Oficejo de UEA por afranko, kotizoj kaj mendoj ĝis plej malfrue ~~31 Decembro 1929.~~ 31 Decembro 1935.

GENÈVE,
la 1an de Decembro 1926.

Hans Jakob
Direktoro

1, Tour de l'Ile.

# Ekslibrisoj (2)

## C Aranĝi kolekton de (numismatikaj) ekslibrisoj




Unu el la unuaj problemoj koncerne la aranĝadon de tema kolekto estas la ordigo de la objektoj mem. La pli kutima metodo por aranĝi ĝeneralan kolekton (t.e. laŭlande, sekve laŭ artistoj kaj fine ĉu laŭ dato, ĉu alfabete, surbaze de la nomoj de la posedantoj) tute ne konvenas por tema kolekto. Tia ordigo ja tute ne rilatas al la ĉefa temo de la kolekto. Vere taŭga estas ordiga metodo, se la ordigo povas esti adaptata al la temo. Ekzemple kolekto pri Don Quijote, ordigita laŭ la sekcio de la koncerna romano, kiu estas montrata. Do, ekzemple ĉiuj "bataloj kontraŭ mueliloj" kune. Tiu neceso por krei logikan ordigon por kolektantoj tute ne estas nevenkebla problemo.

La numismatiko jam delonge uzas tradician ordigon. Krome oni malkovros, ke la ekslibriso ebligas montri antaŭ ĉio numismatikajn temojn, kiuj ne konvenas en la kutima ordigado de monero- aŭ medalokolekto. Ekzemple, la objekto mem, la arkeologia trovaĵo, la monerfarado aŭ la aganta kolektanto. Evidente oni diferencigu inter unuflanke ekslibrisoj kiuj montras monerojn aŭ medalojn, aliflanke ekslibrisoj kun alispecaj numismatikaj bildoj. Koncerne monerojn kaj monbiletojn, oni uzu la kutiman aranĝadon ĉefe laŭ kronologaj kaj geografiaj indikoj, surbaze de la prefero de la kolektanto. Moneroj el iu epoko estas aranĝataj geografie, naciaj moneroj kronologe. Same por medaloj. Krome eblas ordigi surbaze de motivo aŭ funkcio, ekzemple historiaj medaloj, korporaciaj medaloj k.a.

Priskribo de ekslibriso enhavu nepre jenajn informojn:

- nomo de la artisto
- grafika tekniko
- jarindiko
- devenejo de la artisto
- mezuroj de la bildo
- koloroj de materialo kaj bildo
- nomo de la posedanto

Por la teknikaj specoj ekzistas internacia kodaro:

Profunda preso: C1 = ŝtalgravuro
C2 = kuprogravuro
C3 = akvaforto
C4 = seka grifilo
C5 = akvatinto
C6 = molverniso
C7 = mezotinto
C8 = plastogravuro

Reliefpreso: X1 = ksilogravuro (laŭlongvejne aŭ transversvejne)
X2 = lignogravuro
X3 = linoleumgravuro
X4 = plumbogravuro
X5 = zinkogravuro
X6 = plastogravuro

Senreliefpreso: L = litografio
S = ŝablonpreso

Fotomekanika reprodukto: P1 ĝis P8

Tipografio: T







Bibliografio:


- W.K. De Bruyn: “De numismaat en zijn boeken”, “De beeldenaar 5” (1981)
- W. Grasse: “Numismatiker-Exlibris” (München 1976)
- G-Meyer-Noirel / G. Vaucel: “Exlibris numismatiques et des banquiers / L’Exlibris Français 41”


★60
Vojeto de Industrio
★60
Vojeto de Scienco
Enspeza Imposto: ★200 aŭ 10%
★200
Fervojo Norta
★100
Strato Varsovia
★100
Strato Moskva
★120
Strato Munkena
(Nur Vizitante)
★400
Korso Eŭropa
★75
Luksa Imposto
★350
Korso Azia
★200
Fervojo Okcidenta
★320
Ŝoseo de Zamenhof
★300
Ŝoseo de Kalocsay
★300
Ŝoseo de Auld
Vojo Elizabeta
★140
Kompanio Elektroserva
★150
Vojo Margarita
★140
Vojo Katarina
★160
Fervojo Orienta
★200
Avenuo de Sankta Jakobo
★180
Avenuo de Sankta Marko
★180
Avenuo de Sankta Paŭlo
★200
MONOPOLO
ESPERANTUJA
Placo Muzika
★280
Kompanio Akvo-serva
★150
Placo Belarta
★260
Placo Literatura
★260
Fervojo Suda
★200
Cirklo Hiacinta
★240
Cirklo Narcisa
★220
Cirklo Roza
★220

# V A L O R M A R K O J & V A L O R B I L E T O J

## Ludmono



















En la vasta mondo ekzistas amasoj da diversaj popularaj endomaj aŭ surstrataj societaj ludoj. Sufiĉe ofte la ludantoj devas elspezi “monon”, por pagi eventualan ŝuldon aŭ por aĉeti “stratojn, domojn kaj eĉ hotelojn”. Foje oni uzas senvalorigitajn, iamajn oficialajn monerojn kun kvazaŭa valoro nur en la ludo, foje papermonon skizitan speciale por akompani la ludon, **kiel la montrataj biletoj ĉi supre**.

Probable unu el la pli vaste konataj ludoj en la mondo estas Monopolo, societa, eĉ familia ludo por diversaj partoprenantoj, kiuj uzas specialan ludmonon, uzeblan nur en la ludo kaj havantan nur fantazian valoron. La ilustraĵoj akompane de ĉi artikolo montras ne nur esperantlingvan tablotabulon de tiu ludo, sed ankaŭ diversvalorajn fantaziajn monbiletojn, hazarde kun “spesmilo” kiel fantazia monunuo kaj kun la blazono de iama loka klubo “La Hirundo” (el Tienen, Belgio), aktiva en kaj por Esperanto dum 25 jaroj (ĝis 2017).

**Rimarko**: *en la internacia numismatika mondo iam en Esperantujo* ***vere uzitaj*** *kaj de bankoj akceptitaj* ***spesmiloj kaj steloj*** *erare kaj malprave, estas nomataj “fantaziaĵoj”, kutime kiel ne-oficialaj monunuoj. Tio validas ekzemple nur por ĉi tiu ludmono de Monopolo,* ***sed tute ne*** *por la spesmiloj kreitaj far De Saussure kaj por la steloj de Andreo Cseh, kiuj vere cirkulis kiel konkreta, valora pagilo dum esperantaj eventoj kaj en la ĉiutaga vivo!.*

## *P O R   S P U R E M U L O J !*

# I F E F – medalo







Hodiaŭ peto nepre al (eks-)membroj de IFEF aŭ aliuloj por helpi nin priskribi la montratan medaleton. Ĝi havas la tekston: "ITALA FERVOJISTA ESPERANO-ASOCIO VERONA".

Aliflanke: "SESA VERONA ITALIO KONGRESO".

La informoj kiuj mankas al ni:

- Metalo
- Eldonjaro
- Eldonkvanto
- Diametro
- Pezo
- Medalisto

**Kiu povas informi nin? Antaŭdankon!**

# *H I S T O R I A J   A S P E K T O J*

## “Verda stelo sur la brusto...”

Laimundas Abromas

Ekzistas miloj da insignoj de plej diversaj grandecoj kaj formoj kaj ĉiujn kolekti estas neeble. Aparta kategorio estas la kongresaj insignoj: tiuj de universalaj kaj naciaj kongresoj.

La kolektado kaj esplorado de ordenoj, medaloj, insignoj kaj ĵetonoj nomiĝas **faleristiko**. Tiu ĉi vorto devenas de la malnovgreka „ta falara“, kiu signifas *signon*, *honoraĵon,–donacon*. La Romia Imperio transprenis la tradiciojn de la malnova Grekio. En Romo oni honoris kaj pridonacadis militestrojn kaj legianojn per honoraĵoj, kiujn oni nomis „falera“. Oni alte taksis la militistajn kuraĝon, persiston kaj kontribuon al la venko, krome la iniciatemon kaj aliajn meritojn dum militmarŝoj. Ili estis pridonacataj, honorataj per speciale produktitaj, ornamitaj kaj imponaj honoraĵoj, la „ faleroj“. Tiuj estis rondaj aŭ duonrondaj honoraĵoj kun diametro de 10-20 centimetroj kaj fiksataj sur la brusto. Tempo pasis, tradicioj ŝanĝiĝis, tamen honoraĵoj (faleroj) restis. Ili perfektiĝis, imponiĝis kaj transformiĝis al ordenoj, medaloj, insignoj aŭ ĵetonoj.

Tiu ĉi nova vorto “faleristiko” naskiĝis antaŭ nelonge. Ankoraŭ en la epoko de la dua mondmilito iuj famaj aŭtoroj (von Heyden, von Hessenthal) emfazis, ke honorsignoj, kiel ordenoj, medaloj, insignoj kaj ĵetonoj, estas interesa, specifa kategorio de numismatiko. Estu tiel, ĉar la teknologio de produktado de moneroj, ordenoj, medaloj kaj insignoj estas preskaŭ identa.

Unuaj ŝtataj ordenoj estis konataj en la 10a kaj 11a jc. en Hispanio kaj Portugalio. En la 13a kaj 14a jc. ordenojn emisiis Danlando, Anglio, Vatikano, Sardinio, Aŭstrio, Francio kaj iom poste ankaŭ aliaj landoj.

Kutime faleristikaĵojn oni dividas je tri grupoj: honorigaĵoj, porokazaj aĵoj kaj alispecaj por ĝenerala uzado. Por honori gravajn personojn (ŝtatestrojn, militestrojn, heroojn), ŝtatoj emisiis ordenojn, medalojn aŭ insignojn. Diversaj internaciaj kaj landaj organizaĵoj por siaj membroj emisiis medalojn aŭ insignojn. Menciindaj estas skoltaj, sportistaj, fervojistaj, aviadistaj kaj aliaj profesiaj unuiĝoj kaj diversaj kluboj. Okaze de jubileoj, kongresoj, konferencoj kaj festoj oni ankaŭ emisiis medalojn kaj insignojn. Ili estis emisiataj en pli grandaj kvantoj, do ili ne estis tiom valoraj kiel ordenoj, kvankam certaj ekzempleroj estas tre interesaj kaj imponaj.

Tria grupo de insignoj estas ĝeneraltemaj. Tiuj estas ekzemple insignoj porturistaj pri diversaj temoj, kiel okazintaĵoj, urboj kaj blazonoj.

En Eŭropo famis la produktejo de Huguenin en Svislando, de A. Bertran en Francio, de R. Tavast (estono) en Ruslando kaj ankaŭ aliaj malpli famaj, kiuj produktis ordenojn, medalojn kaj insignojn.

La pli konata insigno de esperantistoj estas la verda kvinpinta stelo. La verda koloro simbolas esperon kaj la kvin pintoj la kvin mondpartojn. Pri la oficialigo de tia Esperanto-insigno oni trovas neniun mencion. Povas esti, ke tia oficialigo neniam okazis. Tion sugestas ankaŭ la letero de d-ro L. L. Zamenhof, aperinta en “The British Esperantist” 1912, p.34: “*Pri la deveno de nia verda stelo mi nun jam ne memoras bone. Ŝajnas al mi, ke pri la verda koloro iam atentigis min sinjoro Geoghegan (irlandano) kaj de tiu tempo mi komencis eldoni miajn verkojn kun verda kovrilo. Tiam venis al mi en la kapon, ke ni povas ja konsideri tiun koloron kiel simbolon de Esperanto. Pri la kvinpinta stelo, ŝajnas al mi, ke unue ĝin presigis sur sia gramatiko s-ro Beaufront (franco). Tio plaĉis al mi kaj mi prenis ĝin kiel signon”.*

Franca pioniro de Esperanto, s-ro Beaufront, aliĝinta al Esperanto jam en 1888, enkondukis Esperanto-insignon, medaleton kun verda stelo sur blanka fono. Laŭ lia mendo fabrikis ĝin en Rusujo juvelisto Stahlberg (estono). Ĝi montriĝis necesa kaj tre utila, kiam oni ricevis viziton de alilanda esperantisto. Tamen oni necesas aldoni, ke laŭ historiaj fontoj la unua persono, kiu proponis en 1892, ke ĉiuj esperantistoj surhavu egalan insignon, estis la anglo B. Johnson. Lia ideo, kvankam ne oficialigita, estis akceptita kaj tute populariĝis. La insigno en sia plej simpla formo estas verda kvinpinta stelo, nun plej ofte kun litero E en la mezo, uzata dum kongresoj, konferencoj ktp. Plejparte ili estas metalaj, tamen aktuale el moderna materialo malplikosta, kiel plasto.

Dum la unuaj du UK-oj oni ne uzis oficialan kongresan insignon. Se iu tamen surhavis insignon, estis la “primitiva” kvinpinta stelo, kiun laŭ onidiroj surhavis eĉ d-ro Zamenhof mem. Nur dum la 3a UK en 1907 en Cambridge, Britujo, oni uzis la unuan fojon malgrandan metalan steleton, verdkolore emajlitan, kiu pendis je verdkolora rubandeto. Sur flavmetala, verde emajlita steleto apenaŭ legeblis la teksto ***“Esperanto Kongreso en Cambridge 1907*”** (vidu sube maldekstre). La stelopintoj de maldekstre dekstren estis nur 15 milimetroj. Dorsflanke oni legis, ke ĝin produktis Glaser kaj Sohn, Dresden. La stelo pendis je grizverda silka rubando, 40 mm longa, 16 mm larĝa. Sur jakon oni povis ĝin alfiksi per fermpinglo. La kongreson partoprenis 1317 geesperantistoj. Tamen, la insigno nun estas jam tre rara kaj verŝajne ne multaj ĝisvivis.






**La ENA-redakcio tutkore dankas sinjoron Laimundas Abromas pro la ege interesa kontribuaĵo.**

## LA PREMIO “KLARA SILBERNIK”

“Mia edzino plej fidele kaj plej sindone partoprenis en ĉiuj suferoj kaj malagrablajoj, kiujn Esperanto donis en la unuaj jaroj,” skribis Zamenhof al Êmile JAVAL la 10an de julio 1905.

Ja Klara SILBERNIK senrezerve kuraĝigis kaj helpis la lingvo-projekton kaj, postedziniĝe, la diskonigon de la unuaj lernolibroj de D-ro Esperanto.

Kvankam Klara estis modesta kaj diskreta, Zamenhof volis, ke ŝi estu apud li ĉiufoje, kiam temis pri esperanto. Ili partoprenis en ĉiuj unuaj kongresoj ekde la unua en Bulonjo-ĉe-Maro.

Zamenhof ne postvivis la unuan mondmiliton, sed Klara senmanke partoprenis en la sekvantaj universalaj kongresoj ĝis sia morto en 1924.

Esperanto multe ŝuldas al ŝi.



Zamenhof kaj Klara Silbernik (1908)

Kiam mia karmemora amiko Lluís HERNÀNDEZ YZAL (1917-2002) eklernis esperanton, verdire iom mole dekomence, lia edzino, Teresa, instigis lin pli serioze iĝi esperantisto.

Kolektemulo laŭnature li arigis ĉiuspecajn esperantaĵojn kaj aparte periodaĵojn, kiujn li bindigis, kiam la jarkolektoj estis kompletaj.

Iom post iom pleniĝis ĉambro de lia apotekejo tiel ke, en 1968, inaŭgure estiĝis la Hispana Esperanto-Muzeo. Kun la paso de la tempo la muzeo transpasis la murojn de la apotekejo kaj de la loĝejo ĝis kiam Teresa diris al li: “**Bone. Ĉu vi aĉetos tendon kaj ni loĝos surstrate, ĉu vi konstruigos domon por lokigi tien la muzeon?**”. Tiel naskiĝis la konstruaĵe grandioza kaj enhave riĉa 250-kvadratmetra Muzeo, kiu situas ĝuste sur la Zamenhof-strato de la vilaĝo Sant Pau d' Ordal, ne malproksime de Barcelono. La nova muzeo estis inaŭgurita en 1974 kadre de ekskurso de la internacia kongreso de esperantistaj fervojistoj (IFEF) en Tarragona.

Lluís estis danke markita de la komprenemo de sia edzino, kiu, ne nur ne kontraŭstaris lian agadon, sed tute male sinofere apogis ĝin. Pro tio li kreis premion Klara Silbernik sub formo de medalo nur tiucela por omaĝi ĉiujare la edzinon aŭ vidvinon de merita esperantisto memore al la sindediĉo de Klara por Ludoviko Zamenhof kaj esperanto.

La 11an de majo 1975 kuniĝis ducento da esperantistoj, plejmulte katalunaj, en kultura tago de la muzeo. Tiuokaze la organiza komitato de la premio Klara Silbernik atribuis la unuan medalon al Antonia GALBANY, edzino de Antonio CRIACH – agema pionira paro –, kies filino Pepita estas bone konata de la norvega kaj alilanda movado. Samokaze Teresa, edzino de Lluís, ricevis kroman honormedalon.

De tiam, ĉiujare, unu edzino aŭ vidvino de esperantisto kataluna aŭ hispana ricevis la belan medalon montranta la buston de Klara Silbernik-Zamenhof. Fariĝis kutimo, ke la honorigo okazu en programo de hispana kongreso de esperanto.

Kiam mortis Lluís, pridemandata Teresa respondis, ke kun la nemalhavebla helpo de ilia filo Rafael' ŝi iel pluvivigos la muzeon, sed prefere estas fermi la premion. Ŝi krome sugestis al la organiza komitato, ke la lastan medalon ricevu la edzino de Árpád MATHÉ, entuziasma kaj plej kompetenta kunlaborinto de Lluís por bibliografio. Ambaŭ paroj kutimis sin akcepti jen en Sant Pau d' Ordal, jen en Budapeŝto.

Tiel okazis, senceremonie, kiel fina punkto al atribuo de entute 27 medaloj de la premio Klara Silbernik.

*Jean Amouroux*

# *T E R M I N A R O*

## Alfabeta listo (37)

**faleristiko:** *kolektado, esplorado kaj studado de ordenoj, medaloj, insignoj kaj ĵetonoj laŭ la sama metodo, surbaze de la teknologio de la produktado, kiu estas preskaŭ identa*

**frapo:** *malgranda stampo, kutime celanta ŝanĝi la valoron aŭ areon de cirkulado*

**hibrido:** *1) monero, frapita kun miskongruaj stampoj por la averso kaj la reverso 2) precipe koncerne martelitajn monerojn, monero, sur kiu oni uzis erare samspecan stampon ambaŭflanke*

**kablorando:** *monera aŭ medala rando kun kablomotivo*

**kanalrestaĵo:** *en fanditaj moneroj videbla restaĵo de la kanalo tra kiu la fandita metalo fluis en la muldilon*

**kapo:** *portreto sen ŝultroj*

**kolumo:** *stampo por la rando, kiu ankaŭ malhelpas la metalon ekspansiiĝi trans la deziratan diametron*

**komerca monero:** *monero, ĉe kiu estas klare, ke ĝ*i *estis farita por speciala okazo. Tiaj moneroj havas malsaman bildon ol cirkulaj moneroj.*

**krucflanko:** *en la mezepokaj moneroj la flanko, sur kiu aperis kruco. La kruco kutime ebligis tranĉi moneron kaj doni al la ricevanto kontrolon pri la ĝusteco de la tranĉo.*

**pezo:** *la tuta pezo en gramoj de monero aŭ medalo. La pezo de la oro aŭ arĝento ankaŭ estas grava por komercaj moneroj.*

**regno-monero:** *nederlanda monero monfarita en iu regno regata de Nederlando*

**segmenta kolumo:** *vidu "kolumo" + se la kolumo konsistas el pluraj (kutime tri) partoj (19a jc.), ĝi nomiĝas segmenta kolumo*

**ŝraŭbita:** *pregita per ŝraŭbo, kiu en la maŝino kaŭzas ŝraŭbmovon kaj havas pezojn por movi la stampilojn sur la rondelon kun multe pli da forto ol eblas per martelo*

**ŝrumpo:** *procezo de kuniĝado de la du partoj de dumetala monero. La ŝrumpado okazas dum la farado de la monero.*

**takso:** *unuo esprimata en alia unuo, do la valoro de monero esprimata en kontunuo*

**tranĉita monero:** *monero dividita en diversaj partoj, ofte dum katastrofaj epokoj, kiam mono mankas aŭ maloftas*

# Kriptomono: nenio nova sub la suno!

La allogeco de kriptomoneroj ne malkreskas en la homa cerbo, male! Kial?

Tio baziĝas sur la kredo, ke nova teknologio (la t.n. blokĉena teknologio) kreos tute novan specon de mono kun du grandaj avantaĝoj. Ĝi estiĝus surbaze de liberaj iniciativoj kaj superfluigus naciajn instancojn. Krome, ĝi ne bezonus tiajn abomenindajn financajn perantojn, kiel bankoj kaj aliaj financaj institucioj.

Rigardante iun ajn monbileton el kiu ajn parto de la mondo, vi konstatas, ke ĉiuj monunuoj estas ligitaj kun iu ajn konkreta nacia ŝtato. Tamen estas unu escepto: la eŭro, sed ĝi estas ligita kun eĉ dudeko de naciaj ŝtatoj!

Tio ne ekestis hazarde. **Kontraŭe al oro, la moderna mono ne havas iun internan, esencan valoron.** Mirinde tamen estas, ke tiu financa interhoma rimedo, kiu do mem ne havas iun ajn valoron, estas uzata por aĉeti kaj pagi. Kial mia frizisto akceptas monbileton kiel pagilon por iu ajn servo, malgraŭ la fakto, ke tiu bileto tute ne havas esencan valoron? La kialo estas, ke li prave **FIDAS** povi uzi senĉese la saman bileton kiel pagilon alitempe kaj aliloke. Krome, li fidas, ke ĝi havos (pli-malpli) la saman valoron kiam li elspezos ĝin.

Moderna mono, inkluzive paperpagiloj, estas apogata kaj subtenata sur **FIDO**, fido ke aliuloj akceptos la saman pagilon por pagi kaj ke ĝi ne tuj perdos sian aĉetpovon. Sed, kial oni kreis tiun fidon?

Pasintece en liberaj merkatoj, sufiĉe ofte estis eksperimentata per ne-oficiala monkreado. Ekzemple en Usono en la 19a jarcento ekzistis “free banking”, t.e. ke privataj bankoj eldonis proprajn monbiletojn. Kio ege similas la eksperimentadon en la mondo de kriptomono. Tute ne ekzistas limo koncerne la kvanton de proponantoj, kiuj kreis novan bitmonon. Pasintece kaj aktuale, la granda problemo restas, ke tiu agado ekkonfliktis kun la esenco de interrilata fido!

**Kiel mi povas esti certa, ĉu la kriptomono, kiun mi akiris, jes aŭ ne estos akceptata de aliulo? Krome, ekzistas diversaj tiaj modernaj monrimedoj!**

Ĉu mia bitmono ne perdos sian valoron? Oni konstatas tre grandan ŝanĝiĝemon en la reciprokaj prezorilatumoj de tiuj diversaj kriptomonoj kiel pasintece en Usono, kiam ĉiu banko permesis al si mem eldoni proprajn monbiletojn. Tiun ŝanĝiĝemon kaŭzis i.a. la agado de fraŭduloj. Kaj la historio nuntempe ripetiĝas:

*La 32-jaraĝa Sam Bankman-Fried, fondinto de la t.n. “Kripto-borso”, estas kondamnita de la tribunalo de Manhattan (Usono), por resti dum 25 jaroj en malliberejo. Li fondis la aktuale bankrotan Kripto-borson FTX.*

*Inter 2019 kaj 2022 li forfraŭdis miliardojn de siaj partneroj kaj transigis tiun kapitalon al sia persona investa fonduso. Tial la populara negoco por kriptomono bankrotis. Laŭ la federacia prokuroro, kiu estis postulinta punon de 50 jaroj, tiu kazo “estas la plej granda financa fraŭdo en la tuta usona historio.”*

Tiu problemo koncerne fidon tiam estis solvita de la tiamaj instancoj mem, kiuj akiris monopolon, por eldoni monon kaj tiel kreis nacian monunuon kiel legitiman pagilon. Tiel la loĝantoj de tiu ŝtato povis fidi, ke la oficiala monunuo estos akceptata de ĉiuj aliaj loĝantoj. Sen tia monopolo ne eblas solvi la problemon de fido aŭ malfido.

Tio ankaŭ koncernas la kriptomonon. Tute ne atendinda estas la fakto, ke bitmono estas produktata per alia teknologio ol en pasinta epoko. Nova teknologio neniel solvas la problemon de la fido. Eĉ en epokoj, kiam la instancoj ne sukcesas stabiligi la aĉetpovon pro inflacio. La historio tamen montras, ke inflacio devas esti vere altega por subfosi la fidon de la loĝantaro.

La alia revo de la adeptoj de bitmono, nome ke tiaj pagiloj ekiĝas sen financaj perantoj, jam estas klare kontestita per la fakto, ke preskaŭ ĉiuj kriptomonoj estas eldonataj de financaj perantoj, tre ofte kun ege fia reputacio. Ankaŭ tio devus unuavice iel esti korektata de la instancoj.

Vere, sub la suno nenio estas nova!

Verkis: profesoro Paul de Grauwe

Fonto: artikolo en la belga gazeto “De Morgen”, la 26an de marto 2024



***R E T P O Ŝ T O***

de vi por ni!

## Reagoj kaj konversacioj

*17.01.2024   9:54*

*Kara Jozefo,*

*Jen la provlegenda numero per We Transfer, kiu lastfoje estas sendata al vi el la malnova domo en Tienen. Mi kiel kutime petas vin rigardi ĝin per lupeo kaj tial jam nun dankas vin tutkore.*

*Amike*

*Bert*

19.01.2024   16:48

Kara Bert,

per WeTransfer mi sendis al vi la provlegitan revuon, samtempe mi deziras multan ĝojon kaj sukceson pri ĝi.

Amike: Jozefo

20.01.2024   11:29

Kara Bert,

mi parolis pri via/nia revuo al Balázs Wacha (Blazio Vaha), lingvisto, interlingvisto, iama profesoro ĉe la interlingvistika katedro de la budapeŝta universitato ELTE. Li ŝatus ricevi ĝin. Eble iujn interesas lia dulingva volumo "Pri Esperanto kaj koneksaĵoj", elŝutebla senpage ĉe https://mek.oszk.hu/25200/25200/.

Amike: Jozefo

*23.01.2024   9:29*

*Tre estimata Sinjoro Wacha!*

*Mia amiko Jozefo Horvath, i.a. provleganto de "Esperanta Numismatiko", informis min pri via intereso por la ENA-revuo.*

*Kiel provnumeron mi sendas al vi la lastan numeron de la deka jarkolekto. Tre baldaŭ aperos nova numero.*

*Esperante, ke vi dezirus tute senpage aliĝi kiel 168a individua membro, mi aldonas informilon pri nia asocio kaj ties revuo.*

*Altestime mi salutas vin*

*samideane kaj numismate,*

*Mag.Fil.Bert Boon*
*Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)*
*Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"*
*Fakdelegito pri numismatiko*

23.01.2024 13:21

Estimata Bert Boon, tre koran dankon, mi baldaŭ trarigardos vian sendaĵon,

Kun respekto kaj amikeco

Blazio Vaha

*23.01.2024 18:34*

*Estimata samideano,*

*Mi jam dankas vin pro via rapida reago.*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

22.01.2024 14:16

Estimata s-ro Boon,

bedaŭrinde mi ne povas respondi al via demando, ĉar tiam mi ne estis en BEA. Mi nur scias, ke la medalo estis farita en ŝtata monfarejo, kio signifas, ke la nombro de la medaloj estis granda, verŝajne pli ol mil. Rilate la oro, ĝi ne estas vere ora, oni nur nomis ĝin oran.

Baldaŭ mi sendos al vi la priskribojn de la plaketoj. Mi preskaŭ estas preta.

Salutojn!

Maja Gorova

*22.01.2024 15:49*

*Multan dankon pro la informoj!*

*Ĝis baldaŭ,*

*Bert*

23.01.2024 18:48

Saluton denove!

Mi estas preta kun la priskribo de la plaketoj. Se la teksto ie ne estas sufiĉe bona, mi permesas al vi korekti ĝin. Mi sendas novajn fotografaĵojn kaj esperas, ke ili estas pli bonaj. Vi vidos, ke la koloroj de la plaketo pri la kongreso en Brajtono kaj alia pri la konkurso estas diversaj. La kaŭzoj estas kelkaj: la fandaĵoj, la patino, la fotiloj kaj la lumo estas diversaj. Do, mi esperas, ke plenumis vian peton kaj por mi estis plezuro helpi al vi kaj al la revuo. Se vi bezonos denove mian helpon, bonvolu, mi pretas!

Sincere, Maja

*24.01.2024   20:51*

*Saluton kara Maja!*

*Vi vere sukcesis klare kaj flue priskribi la artefaktojn. Por mi tiu efektive plifaciligos la laboron. Multan, multan dankon al vi, unuavice, kaj al via edzo.*

*La novaj fotoj estas tre bonkvalitaj kaj bonege montras la skulptistan talenton de Bogomil.*

*En la dua numero de la 11a jarkolekto mi unue priskribos kaj montros la "oran" medalon kaj en la sekvontaj numeroj la plaketojn po ĝis en la 12an jarkolekton.*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

29.01.2024   13:48

Saluton!

Ni, kun Bogomil tutkore dankas pro la interesa revuo!

Maja

*29.01.2024   18:31*

*Karaj Maja kaj Bogomil!*

*Tute ne dankinde. Decas, ke mi dankas vin. Sen vi ambaŭ mi ne estis sukcesinte kompili tiom interesan numeron!*

*Kiel jam promesite, vi ambaŭ dum pli ol unu jaro estos la "honoraj membroj" de la ENA-redakcio!*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

*23.01.2024   18:23*

*Kara samidean(in)o!*

*Vane mi jam delonge spuras foton de la medalo ligata al la Premio Klara Silbernik. Ĉu nek privata persono, nek Esperanto-muzeo posedas almenaù unu ekzempleron? Mi strebas aldoni tiun medalon kun foto kaj mezuroj al la baldaù aperonta unua Katalogo de Esperanto-Numismatiko…*

*Mi tutkore dankos samideanon kiu povus helpi min kaj sendos al tiu persono danke bronzan Zamenhof-medalon!*

*Samideane kaj numismate,*

*Mag.Fil. Bert Boon*
*Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)*
*Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"*
*Fakdelegito pri numismatiko*

23.01.2024   22:14

Kara Bert,

Tiuj personaj posedantoj de la medaloj estas jam tre maljunaj aŭ eĉ forpasintaj. Sed ni vidos, kion ni povas fari.

Amike,

Ana Manero

Federación Española de Esperanto / Hispana Esperanto-Federacio
Rodríguez San Pedro, 13, 3. ES-28015 Madrid (Hispanio)

*23.01.2024 22:57*

*Multan antaŭdankon, kara Ana! Ke vi reagas estas agrabla surprizo.*

*Amike,*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

25.01.2024 15:31

Estimata kara Bert,

Dankon pro la bela e-revuo pri numismatiko. Dankon pro via laboro.

Mi skribas al vi por du kialoj :

1) Por la Europa Kongreso en Strasburgo, mi planas aĉeti 500 tabulojn da ĉokolado kun kakao el Tanzaniofarita de KIM'S CHOCOLATE en Belgio. (adreso donita de esperantista tanzaniano) Ĉu vi konas tiun firmaon ? Mi morgaŭ skribos al ili por provi aĉeti tion kaj peti ĉu ili konsentas fari paperan koverton en esperanto,se ne sendi sen koverto kaj mi trovos firmaon loke por fari koverton en esperanto/franca/svahila kiel simbolo por helpi UK en Tanzanio. (mi trovis subvencion por tio).




Por la Europa kongreso mi jam eldonis PM ( ĉi-aldone).

2) Mi studas por rekrei la valuton "STELO", sed etika, neŭtra, bazita je naciaj valutoj de duono de la mondo.

Iom komplika, sed mi esperas solvi la problemon ; unue mi devas krei grupon por bone studi tion detale.

Ĝi funkcius per apo en la telefono...ni povus pagi ie ajn en la planedo per steloj tuj...sed nur al membroj de iu kreonta kooperativa banko. (aù ligita al ekzistanta etika banko).

Mi iom kopius la lokan valuton "La Cigogne" en nia regiono, kiu funkcias nur per telefono, sed ni uzus ĝin tutmonde por esperantistoj kaj ne- esperantistoj.

Ĉu laŭ vi interesa ideo?

Esperanto estas neŭtrala tutmonda lingvo. Kial ne fari same per valuto (iom kiel oni faris por krei la EUROn)?

Plej amike,

Michel Basso

Membro de LKK Europa Kongreso en Strasburgo Majo 2024.

*26.01.2024 11:57*

*Kara Michel*

*Unuavice multan dankon pro viaj afablaj vortoj pri nia ENA-revuo!*

*Mi legis kaj relegis la artikoletojn pri viaj du projektoj. Pri la unua jen iom da komento. La firmaon mi konas pasive. Mi longtempe loĝis en Tienen, sed nuntempe kaj definitive transloĝiĝas al Munkzwalm, en distanco de pli ol 100 kilometroj. Mi deziras al vi sukcesplenan interparoladon kun la firmao, ĉar via projekto estas ege laŭdinda.*

*Krome al mi plaĉas la PM por la Eŭropa Kongreso kaj se eble mi dezirus mendi unu kompletan folion kaj unu neuzitan unuopan PM + unu stampitan sur koverto. Krome mi petas la numeron de via bankkonto.*

*La duan projekton mi 100 % aprobas. Tamen nek ĉiu detalo, nek via strategio estas al mi tute klaraj. Ekzemple, ĉu vi jes aŭ ne volas produktigi ankaŭ monerojn kaj bankbiletojn…?Do jes, iom komplika nuntempe.*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

25.01.2024 20:59

Saluton, Bert.



Jen, ni trovis ekzempleron de la medalo, kiun vi serĉas; vidu la aneksaĵon.

Pri ĝia grando, mi petas al nia kara Rafi (en kopio) doni tiun datumon.

Amike,

Manuel Parra

sekretario de Hispana Esperanto-Federacio

28.01.2024 0:28

Pliaj informoj: la diametro de la Klara-medalo mezuras 50 mm. Dorse estis skribita:

"Honora Medalo al S-rino XXX. (loko kaj dato)"

Amike,

Manuel

*28.01.2024 18:19*

*Multan dankon, Manuel!*

*Reciproke je via servo se bezonota!*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

25.01.2024   21:28

Kara, Bert!

Dankon, pro la sendita vica numero de "EN" N 1 por 2024.

Reciproke mi sendas skanitan jubilean insignon faritan en decembro 2023. Desegnisto estas peterburga esperantisto Sergej Krajuĥin. S-ro Krajuĥin estas aŭtoro de ludkarto "reĝo" kun Zamenhofa portreto.

Aldone estas skanita arĝenta kulero el 1930 jaro ĉerpita el "Heroldo de Esperanto".

Amike, Anatolo.

*26.01.2024   18:18*

*Saluton Anatolo!*

*Multan dankon pro la interesaj aldonoj! Ĉu vi povus sendi al mi la mezurojn, la pezon kaj la materialon kaj se eble foton kaj koncizan biografion de Krajuĥin?*

*Mi antaŭdankas!*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

26.01.2024   20:00

Bonan vesperon, Bert.

Diametro de la insigno estas la videbla parto 37 mm. Pezo estas 15 aŭ 20 gramoj.

Sergej Borisoviĉ Krajuĥin (*07.07.1961). Nacieco: ruso. Esperantistiĝis en 1988. Peterburga ĉefdesegnisto kaj ornamanto de la okazintaĵoj en Sankt-Peterburgo SAT-kongreso en 1996 kaj REU-kongreso en 2010. Aŭtoro de jubilea insigno de la societo "Espero" 1892-2022.

Amike, Anatolo.

26.01.2024   20:02

Saluton, Bert.

La insigno estas metala, pli ĝuste lada.

Anatolo.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

25.01.2024   21:39

Koran dankon.

Verdire, mi mem ne estas numismato, sed mi dankas pro viaj numeroj, ĉar mi mencias similajn fakajn eldonojn en E-informado.

Amike,

Mariana Evlogieva

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

25.01.2024 22:31

Kara Bert,

sukceson en la dua jardeko minimume tian, kiel en la unua!

Korajn salutojn al vi kaj al via ĉarma Vivien.

Amike

Fejfi

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

26.01.2024 11:45

Kara Bert

Elkoran dankon!

Mi aldonis ĝin al la kolekto, vidu:

Esperanto arĥivo Esperanto Numismatika Asocio (alcl.be)

Albert Claesen

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

26.01.2024 13:38

Kara Bert!

Dankon pro la revuo. Kiel kutime mi kunhavos ĝin kun aliaj bjalistokanoj.

Mi salutas vin

Maria Niemyjska

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

27.01.2024 11:04

Saluton Bert

Estas ege interesa mi ŝatis kaj dankas vin por sendi tion al mi

Amike

Liliane Ketelers (La Konko Ostendo)

*27.01.2024 16:34*

*Saluton Liliane!*

*Multan dankon pro via pozitiva reago! La venonta numero aperos fine de aprilo.*

*Mi petas vin paroli pri ENA en via grupo de samideanoj. Multan antaŭdankon!*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

04.02.2024   15:46

Kara Bert,

dankon por ENA-revuo jarkolekto 11 numero1,

Reciproke mi demandas vin, ĉu mi jam sendis al vi jenan tekston pri ora trezoro de la slovaka urbo Košice ?

Se ne, vi trovos ĝin alkroĉita iom sube. Pardonu, se mi ripetas min.

Amike Josef Kříž

*06.02.2024   17:08*

*Dankon pro la interesa artikolo, kiu estas nova por mi kaj ENA. Ĝi baldaŭ aperos en nia revuo.!*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

06.02.2024   17:08

Bone, kara Bert, ke la artikolo estas por vi utila.
Josef

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

10.02.2024   21:26

Estimata Bert.

Kun intereso mi legas kaj studas  de vi redaktatan revuon pri Esperanto numismatiko. Ĝi estas altvalora,informoriĉa kaj impona. Mi dankas pro via modela, sindonema laboro, kvankam ĝi estas temporaba.Mi legis la kvar lastajn numerojn de ENA kaj mi decidis aliĝi al ENA.Mi volas konstante legi tiun revuon pri esperantaĵoj, ĉar mi mem estas kolektanto de insignoj, poŝtkartoj, poŝtmarkoj, kovertoj, glumarkoj.Mi mem verkis dekon da E-insignoj, kiujn produktis R.Endriulaitis. Li estis membro de nia E-klubo "Horizonto" en urbo Jurbarkas, Litovio.Mi kunsendas al vi kvar fotojn el la kolekto de miaj E-insignoj.Tio ĉi estas nur duono de mia insigna kolekto.Mi estas en aĝo de 68 jaroj kaj mi ne plu volas kolekti. Mi intencas iam donaci miajn kolektojn al iu serioza kolektanto pli juna ol mi aŭ al klubo, ĉar mi mian liberan tempon fordonas al literaturo.

Kun amikaj salutoj

Laimundas Abromas

*17.02.2024   18:52*

*Kara samideano Laimundas,*

*Unuavice mi pardonpetas pro la prokrasto de mia reago. Kaŭzis ĝin la evento, ke mi (75 jaraĝa) kaj mia edzino la 9an devis transloĝiĝi al alia domo. Apenaŭ restis tempo por manĝi!*

*Hodiaŭ mi finfine trovis tempon por akcepti vin kiel nova membro de ENA.*

*Sekve mi dankas vin tutkore pro viaj laŭdaj komentoj koncerne la revuon!!! Mi daŭrigos plejeble longtempe!*

*Estas interese, ke vi i.a. kolektas insignojn, ĉar mi mem, krom moneroj kaj medaloj, kolektas insignojn de la Universalaj Kongresoj.*

*Jen helpopeto. Mi jam delonge serĉas artikolon kiu klarigas kiel el moneroj kaj medaloj estiĝis insignoj. Ĉu vi povus helpi ENA-n?*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

26.02.2024 9:10

Saluton,estimata Bert.

Mi dankas al vi pro via letero.Vi interesiĝas kiel mi eksciis pri ENA revuo? Mi malkaŝos aferon.En la gastejoesperanto.lt oni povas ekscii multajn novaĵojn pri esperantista aktivado tra la mondo.Tiun gastejon prizorgas Litova Esperanto Asocio kaj en ĝi ankaŭ aperas plene multaj revuoj , ankaŭ via ENA-revuo.Pro la abundo da novaĵoj, oni kutime ne sukcesas ĉion tralegi. Antaŭe mi ne atentis ENA revuon,tamen post la artikolo de A.Sidorov pri insignoj, mi jam legas ĝin.Mi jam trarigardis ĉiujn revuojn ekde la unua numero kaj trovas, ke ili estas imponaj,modele aranĝitaj,serioze redaktataj.Via laboro estas kolosa. Mi bondeziras al vi fortan sanon, por ke vi plu daŭru vian unikan,sinoferan laboron per kaj por Esperanto.Mi trarigardis ĉe mi posedatan literaturon pri insignoj. Kvankam ĝi ne abundas.Mi verkos artikolon pri insignoj kaj post 2-3 semajnoj sendos al vi. Kun bondeziroj

Laimundas Abromas

07.03.2024 20:13

Saluton kara Bert.

Laŭ via peto, mi verkis artikoleton pri insignoj.Sed mi ne scias, ĉu ĝi indas por publikigo, vi decidu mem.Mi aldonas kopion de bildo pri la unua insigno por UK en Britujo.

Kun amikaj salutoj

Laimundas Abromas

*02.03.2024 11:41*

*Kara Laimundas,*

*Multan dankon pro via laboro. Mi sendube trovos lokon por la artikolo en nia revuo!*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

14.02.2024 7:37

Bonan tagon, kara Bert.

Mi havas en skanita formo malnovan verkon eldonitan en 1912. Mi opinias, ke tabelo taŭgos por nia gazeto.

Amike, Anatolo.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

19.02.2024   21:28

Dankegon, kara Bert, pro via valora kunlaboro en serĉado de esperantaĵoj. Ĉi-foje mi havas la plezuron iom rekompenci vian faron: tie ĉi estas ligilo al la E-Muzeo de Esperanto en Ĉinio.

https://www.sinoatlantic.com/news4a.htm

Ĝin vizitu: valoras la peno!

Amike-filatele,
via Elda

PS: dankegon pro la sendo de la ENA-revuo, kiu estas senfina puto je mirindaj sciindaĵoj! Valorega revuo! La artikoloj estas tiom historio-riĉaj kaj brile interesaj, ke nia simpla LVL tute hontas antaŭ ĝi kaj sin kaŝas en endoma anguleto por ne montri sian ruĝiĝon. Vi estas vere eksterordinara specialisto kaj historiisto pri medaloj, moneroj ks. Krome, mi multe ĝuas vian elegantan kaj perfektan verko-stilon!

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

*27.03.2024   12:02*

*Saluton kara samideano Stanislao!*

*Hieraŭ mi ricevis leteron de mia amikino Elda Doerfler por informi al mi, ke en Gliwice baldaŭ datreveno de la klubo estos festata. Laŭdire estos kreataj ne nur poŝtmarkojn (kiujn mi intencas mendi) sed, ankoraŭ pli interese por ENA ankaŭ specialajn numismatikaĵojn!*

*Jen do mia kompleta helpopeto:*

*-Ĉu mi povus ricevi* ***baldaŭ****(por la aprila numero de nia revuo) la nomon kaj biografion de la artisto-medalisto por la koncerna rubriko?*

*Mi tutkore dankas vin*

*samideane kaj numismate,*

*Mag. Fil. Bert Boon*

27.03.2024   14:26

Kara amiko Bert!

Longe mi ne kontaktiĝis kun Vi, kvankam mi kun granda plezuro legas preparatan de Vi revuon.

Ĉijare esperantista klubo kies multjara prezidanto mi estis, en mia urbo Gliwice festas 115an datrevenonde esperanta agado. Fakte esperantistoj estis en mia urbo jam en la jaro 1909 (tiam en Gleiwitz), sed aktuala klubo formaleestis fondita en la jaro 1962. Pro la fakto ke esperanta movado funkcias de 115 jaroj ni en junio ĉijare festostiun jubileon.

Por tiu festo ni preparas jam kelkajn esperantaĵojn inter tiuj estas ankaŭ numismatikaĵoj.

Ĉi kune mi sendas al Vi projektojn de simbolajĵetonoj (moneroj) kaj simbola monbileto. Kompreneble ke mi provos sendi originalojn al Vi kiam ili estos pretaj. Nun mi sendas al Vi projektojn. Pri tiuj projektoj Vi povas mencii en la revuo.

Se temas pri materialoj (poŝtkarto, poŝtstampo, kaj poŝtmarko) ili estos pretaj por nia junia ekzpozicio.

Mi provos sendi ĉiujn materialojn al Vi.

Mi pensas, ke pri pago ne estos problemo. Mi uzas la pagsistemon PayPal. Certe Vi konas tiun eblecon.

Amike kaj samideane –

Via Stanislavo

*28.03.2024 15:56*

*Kara Stanislaw!*

*Multan dankon pro via tre tuja respondo kun laŭdvortoj por la ENA-revuo.*

*Mi tre sincere gratulas vin kaj la klubon okaze de la datreveno kaj la festo. Krome pro la admirinda ideo eldoni diversajn memoraĵojn kaj unuavice pro tiuj bonaspektaj numismatikaĵoj en tri diversaj tipoj kaj kun valorindiko, nomindaj ĵetonojn aŭ "pagmedalojn". Ĉu ili ankaŭ rolos fakte kiel dumfestaj pagiloj? Kroma interesa objekto, agrable skizita, estas la speciala monbileto!*

*Al tiu granda evento kaj al la objektoj ni donos lokon en la venonta rubriko "Anoncoj kaj Eventoj". En la rubriko "Medalistoj" de la sama aprila numero ni intencas montri foton kaj prilumi la meritojn de la artisto en de vi alsendota artikolo.*

*Ĉu mi rajtos mencii vian retadreson, por ke ENA-legantoj eventuale povus mendi ĵetonojn aŭ aliajn objektojn?*

*Amike kaj numismate via,*

*Bert*

08.04.2024 13:32

Kara amiko Bert!
Estas granda plezuro ke Vi volas mencii en ENA pri niaj eldonaĵoj.
Kompreneble ke Vi povas skribi mian adreson kaj mi volonte respondosal ĉiuj ineresotoj.
Se temas pri detaloj ligitaj kun niaj "moneroj" ili ne estos uzitaj dum niaj aranĝoj.
Simple ili estas kiel memoraĵoj ligitaj kun nia 115 datreveno. Ili prezentas en kelkaj metalaj specojde unu flanko kupolon de hotelo Victoria en Gliwice kie en la jaro 1909 okazadis la unuaj renkontiĝojde esperantisto kaj rande skribo "115 lat esperanto w Gliwicach - Hotel Victoria" Sur dua flanko estaskrom esperanta stelo kaj simbola valoro 25steloj ankaŭ datoj 1909-2024. Ĉiuj ĵetonoj projektis Gliwice'a Klubo de Kolektantoj (GKK) kaj produktis Grzegorz i Iwona Gacek - pracownia (artlaborejo) " KiM".
Se temas pri prezoj. Ni posedas stokon de dekkelkaj jam produktitaj kompletoj (sed ne estas problemo alprodukti).
Prezo unumetala (aluminio, kupro, latuno) po 3 euroj, dumetelaj po 5 euroj. Kompleto 20 euroj.+ sendokostoj
Pri sendokostoj aktuale mi ne povas skribi ĉar oni anoncas, ke post kelkaj semajnoj ili plialtiĝos. Nun ili estas ĉ. 10 euroj
Kompreneble mi uzas PayPal kun indiko de mia retadreso.
Amike Via Stanislavo

*11.04.2024 21:26*

*Kara Stanislao!*

*Jam multan dankon pro la tre interesaj informoj!*

*Ĉu Grzegorz kaj Iwona estas la artistoj-medalistoj, kiuj kreis la bildojn kaj surskribojn de la medaloj?*

*Permesu, ke mi nun jam mendas por mi  jenajn jubileajn objektojn:*

*Unu kompleton de ĉiuj medaloj, du monbiletojn, du poŝtkartojn kaj du poŝtmarkojn, se eble. Bonvolu sciigi al mi kiom mi ŝuldu, vian adreson kaj numeron de via bankkonto, por ke mi povu ANTAUE pagi al vi la kompletan sumon, inkluzive la sendokostojn.*

*Kiam mi ricevos la medalojn, mi mem povos eltrovi la diversajn mezurojn por povi priskribi ilin en la revuo!*

*Jen mia adreso:* *BERT BOON*

*LIJSTERBESLAAN, 13*
*9630 MUNKZWALM*
*BELGIO EUROPO*

*Tutkore mi antaŭdankas kaj salutas vin,*
*amike kaj numismate,*
*Bert*

***PS. En la nova numero de nia revuo(fine de aprilo) mi propagandos ĉe la membroj (kune kun via retadreso) por stimuli la aĉeton de la jubileaj objektoj, nome en la rubrikoj "DE NI POR NI…" kaj en "ANONCOJ & EVENTOJ"!!!***

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

08.04.2024 1:52

Saluton Bert kiel vi fartas? Mi estas Rafael el Brazilo. Mi ankoraŭ ne tre bone parolas Esperanton do mi daŭrigos en la angla. I'm a numismatist since 2003 and I met Esperanto in 2012 and since then I fell in love with the Esperanto cause, although to this day I still don't master the language.I would very much like to join  Esperanto-Numismatika Asocio. I intend to write articles about the Esperanto collecting, to help spread knowledge about Esperanto and in research I found your association and really liked it, the bulletins are really special! I look forward to hearing from you to find out more about becoming a member of the association. Fartu bone kara amiko!

Rafael Augusto de Mattos Ferreira.

09.04 2024 0:14

Saluton Bert, Koran dankon pro inkludi min en la asocio! Mi trovis la asocion ĉar mi serĉis la libron Esperanto-mono de Hans Jankowski... Mi serĉas materialon por skribi pri kolektado de aĵoj ligitaj al Esperanto, mi estas numismato ekde 2003 kaj filatelisto ekde 2018, mi kolektas ĉiajn aĵojn rilatajn al Esperanto.

Grandan brakumon!

*11.04.2024 21:02*

*Saluton, kara Rafael!*

*Tute ne dankinde. Mi ĝojas pri via membriĝo! Vi estas la sepa ENA-membro el via granda lando! Krome vi ja bone mastrumas la lingvon Esperanto. Gratulon!*

*Ĉu vi dume jam trovis la broŝuron de Hans Jankowski? Hans mi konis persone kaj mi eĉ je la fino de lia vivo aĉetis diversajn medalojn el lia kolekto. Li estas krome en la unuaj dek jaroj* ***la unua kaj nura honora membro de ENA.***

*Kiel vi, mi kolektas diversajn objektojn pri Esperanto, kiel librojn, poŝtkartojn, poŝtmarkojn kaj insignojn, kaj evidente numismatikaĵojn.*

*Mi invitas vin kompreneble verki kaj sendi artikolojn pri numismatiko por nia revuo kaj dankas vin pro viaj laŭdaj vortoj tiurilate.*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

14.04.2024 19:45

Saluton kara Bert.

Dankon pro la respondo, mi ĝojas esti parto de la asocio. Mi provos verki artikolon por la bulteno, sed mi ne povas promesi ĝin por ĉi tiu semestro, aferoj estas okupataj ĉi tie. Se vi bezonas ion rilate al Brazilo, mi estas ĉiam disponebla. Grandan brakumon!

Rafael Augusto de Mattos Ferreira.

*15.04.2024 11:48*

*Kara Rafaelo,*

*Multan antaŭdankon pro via intenco kunlabori kiel ano de la redakcia volontularo! Tamen, tute ne urĝas verki kaj sendi tekston; tio ne estu devigo, sed agrabla tasko, ĉu ne?!*

*Kroma peto hodiaŭ estas- ĉar vi ja jam estas numismato -ĉu vi eble konas* ***esperantajn medalojn*** *eldonitajn pasintece en Brazilo? Se jes, ENA eble povus priskribi ilin por la unua, nuntempe jam preparata Katalogo.*

*Mi kore kaj numismate brakumas vin!*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

17.04.2024 23:17

Kara Bert!

Ĵus hodiaŭ nia amikiĝinta klubo de kolektantoj proponis al nia festo prepari porokazan medalon (kopion)mi sendas al Vi. Ĝia produktado kostos ĉ. 15 eŭrojn Ĝi estos preparita en speciala skatoleto.

Ĉu tiu medalo interesus Vin. Kompreneble ke ĉio kion Vi mendis en antaŭa letero mi preparos kaj sendos al Vi.



Poste mi ĉion kalkulos kaj skribos prezon de mia sendaĵo al Vi.

Amike –

Stanislavo

*18.04.2024 11:03*

*Kara Stanislavo,*

*Multan dankon pro la kroma informo. Vere tre interese! Evidente mi jam mendas* **du ekzemplerojn** *de tiu memormedalo por mia privata kolekto. Do la al vi ŝuldota monsumo kreskos! Mi konsentas pagi per paypall.*

*Mi nepre anoncos la novaĵon en la numero tri de julio, ĉar la aktuala numero du de la revuo jam estas preta kaj baldaŭ aperos.*

*Danke kaj amike,*

*Bert*

***A N O N C O J***

***&***

***E V E N T O J***

## UEA daŭre vendas stelo-monerojn:

**La furorlisto de la Katalogo:**

(Plej grandkvante rete mendataj titoloj dum la pasintaj tri monatoj)

1. Krimo de Katrina, La, Sten Johansson (11 ekz.)
2. Vivo de Zamenhof, Edmond Privat (10 ekz.)
3. Beletra Almanako 47, (6 ekz.)
4. Esperanto Mini-Dictionary, Edmund Grimley Evans (6 ekz.)
5. Esperanto Mini-Course, (6 ekz.)
6. Comment se comprendre en Europe? André Cherpillod (6 ekz.)
7. Stelo-monero, (6 ekz.)
8. Praktika Fundamento de Esperanto, L.L. Zamenhof (5 ekz.)
9. Stelo-monero, (5 ekz.)
10. Stelo-monero, (5 ekz.)
11. Leteroj al juna poeto, Rainer Maria Rilke (4 ekz.)
12. Fundamenta krestomatio de la lingvo Esperanto, L.L. Zamenhof (4 ekz.)
13. Maja pluvo, Julian Modest (4 ekz.)
14. Al eterna paco, Immanuel Kant (4 ekz.)
15. Nepo de Marina, La, Sten Johansson (4 ekz.)

Demandoj:

libroservo@co.uea.org

Katalogo:

https://katalogo.uea.org

Salutas Walter Klag

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

## Jubileo en Glivice kun memormedaloj!

Ĉijare esperantista klubo kies multjara prezidanto mi estis, en mia urbo Gliwice (Pollando) festas la 115an datrevenon de nia esperanta agado. Fakte esperantistoj estis en mia urbo jam en la jaro 1909 (tiam en Gleiwitz), sed la aktuala klubo formale estis fondita en la jaro 1962. Pro la fakto, ke la esperanta movado jam funkcias 115 jarojn ni en junio ĉijare festos tiun jubileon.

Por tiu festo ni preparas jam kelkajn esperantaĵojn; inter tiuj estas ankaŭ numismatikaĵoj.Ĉi kune mi sendas al Vi projektojn de simbolaj ĵetonoj (moneroj) kaj simbola monbileto. Kompreneble, ke mi provos sendi originalojn al Vi kiam ili estos pretaj. Nun mi sendas al Vi projektojn. Pri tiuj projektoj Vi povas mencii en la revuo.

Se temas pri materialoj (poŝtkarto, poŝtstampo, kaj poŝtmarko), ili estos pretaj por nia junia ekzpozicio. Mi provos sendi ĉiujn materialojn al Vi.

**La ENA-membroj kaj aliaj interesuloj bonvolu kontakti min por informoj pri la mendeblaj kolektindaĵoj. STANISLAO MANDRAK:** : stanislaw.mandrak@gmail.com





















# Varbilo por ENA!

**Karaj membroj!**

**Bonvolu fojfoje dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!**

**Bert**

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fakgrupo "Esperanto-Numismatika Asocio" (ENA) kun revuo "Esperanta Numismatiko" en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estis apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.
La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol dek jaroj ĝis **169 individuaj membroj kaj 25 esperantaj** (kaj eĉ neesperantaj!) **organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj**, dise en la mondo.

Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: ***"Mi konsentas aliĝi"***). Krome la NUR PERRETA revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, ni klarigos kiel vi povas (ne devas!) elŝuti la jam aperintajn numerojn. SENPETE sekve vi ricevos ĉiujn novajn aperontajn numerojn. (4 n-rojnjare).

Vi krome rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kajsamideanaj salutoj,

Bert Boon
Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de "Esperanta Numismatiko"
bert.boon@skynet.be